

neŭtraleco partieca

ĉe la adreso <http://www.esperanto.de/gej/fragen/esternei.htm> ĝej ofertas la sekvan informon al la germana informserĉanto rilate al la kvinpinta esperanto-stelo:

Für viele Menschen aber ist ein solcher Stern mit negativen Assoziationen behaftet, man denkt an radikale und anarchistische Bewegungen. Mit solchen Ideen hat Esperanto jedoch nichts zu tun, es ist politisch neutral!

Deswegen und auch um sich von den Kommunisten deutlicher zu unterscheiden, sind viele Esperantosprecher dazu übergegangen, statt dem Stern das Jubiläumszeichen zu verwenden.*

ho ve! vera majstrajo de ĥaosaj antaŭjuĝoj. kion la verkinto diras pri la stelo? «ligita al negativaj kunpensoj, oni pensas pri radikalaj k anarĥiismaj movadoj.» nu, la verda kvinpinta stelo estas multe uzata de islamanoj. kompreneble tiuj sudaj radikaluloj k fundamentuloj vekas negativajn kunpensojn ĉe bona civilizita germano. k krome – ?! – la stelo ankaŭ memorigas pri anarĥiistoj. aŭ ĉu estis komunistoj? la verkinto ŝajne ne

havas klaran koncepton pri tio. sed tio ja ankaŭ ne gravas, ĉar esperanto ĉiukaze ne havas rilaton al tiaj obskuraj ideoj: «Mit solchen Ideen hat Esperanto jedoch nichts zu tun».

estas vere strange, ke multaj diraĵoj de lanti ankoraŭ hodiaŭ plene pravas. ekz-e la jena pri «la t.n. neŭtralaj grupoj»:

Tie ĉiu esperantisto, ĉu revoluciuulo, ĉu «bona patrioto», pagas kotizajon. Ĉu por propagandi senescepte en ĉiuj medioj? Tute ne. La propagandiloj estas tiamaniere farataj, ke ili estas varbpovaj nur en konservativaj rondo.

*Neŭtralismo – Neŭtraluloj,
S.R. 6/1923 (36), p. 1*

Sebastian Hartwig (98 08 19)

* Sed por multaj homoj tia stelo estas ŝarĝita per negativaj asociadoj; oni pensas pri radikalaj kaj anarĥiismaj movadoj. Tamen, kun tiaj ideoj Esperanto havas nenion komunan, ĝi estas politike neŭtrala!

Pro tio kaj ankaŭ por pli klare diferencigi sin disde la komunistoj, multaj Esperanto-parolantoj transiris al uzado de la jubilea emblemo anstataŭ la stelo. [trad. de GM]

Mezismo ne estas neŭtraleco

Ne ekzistas varbocela informado pri Esperanto sen politika karaktero, kaj ofte ĝi tre klare evidentiĝas la situon de sia(j) aŭtoro(j) ene de la politika spektro. La citaĵo forkita de Sebastian en sia artikolo estas aparte amuza ekzemplo de tio, amuza, ĉar ĝia aŭtoro plukas el ĉiuj argumentoj kontraŭ la verda stelo ĝuste la plej politikan kaj antaŭmetas ĝin al la publiko en la sama frazo, en kiu li akcentas la «politikan neŭtralecon» de Esperanto. Konsiderante, ke

- verda stelo neniam estis emblemo de komunistoj aŭ anarkiistoj, kion ĉiuj scias, kaj ke
- partoj de la Esperanto-movado ja tamen havis kaj havas ion komunan kun «tiaj ideoj», kion verŝajne ne la informatoj, sed jes la aŭtoro certe scias,

eblas suspekto, ke la aŭtoro celas ne tute verkonforme kredigi, ke la Esperanto-movado kiel tuto nestas en la meza, la neradikala segmento de la politika spektro.

Jen la kerno de la problemo: kredeble pli senpripense ol laŭcele, multaj identigis la «politikan neŭtralecon» kun la politika *mezismo* (tiu ismo, kiu traktas la mezan politikan pozicion kvazaŭ la plej virtan situon – alia nocio ol tiu de «centrismo»). Tiu mezismo estas karakteriza trajto kaj de Helmut Kohl kaj de diversaj socialdemokrataj politikistoj. Ĝi kompreneble estas io alia ol «neŭtraleco» aŭ «nepolitikeco».

Pripensu, kiom da politikaj starpunktoj aperas eksplicite aŭ implicite en mezismaj informaj tekstoj pri Esperanto (ofte de grupoj sin kredantaj «neŭtralaj»): internacia amikeco estas grava valoro, internacia kunlaboro kaj internaciaj organizaĵoj estas plifortigendaj,

Uno kaj la Eŭropa Unio estas pozitive taksendaj, militojn oni preventu, reciproka nekomprenado de simplaj homoj estas signifa faktoro de internacia mal-

Apernotoj / Impressum

Eldonanto / Herausgeber:
Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj (LEA/G) / Freier Esperanto-Bund für deutschsprachige Gebiete (LEA/G)

Renchener Str. 47, DE-77704 Oberkirch,
(Tel.+Fax: (07802) 90 336)

LEA/G per SAT en TTT:

<http://www.worldnet.net/~sat-esp/>

Redakcio / Redaktion:

Gary Mickle (G.M.), Brüsseler Str. 6,
DE-13353 Berlin, (Tel.) (030) 453 96 47),

retadreso / Internet-Adresse:

101.121591@germany.net.de

Hans Rodewig (H.R.), Stammestr. 86D,
DE-30459 Hannover

Albert Stephan (A.S.), adreso de LEA/G
supre indikita / oben angegebene Adresse
von LEA/G

Aŭtoroj respondecas mem pri siaj artikoloj;
la redakcio havas la rajton mallongigi aŭ
rifuzi alsendaĵojn.

Redaktofino (proksimume): fino de marto,
junio, septembro, decembro

MAGAZINO aperas kvarfoje jare / erscheint
vier Mal jährlich;

abonprezo / Bezugspreis 15,- DM

La membrokotizo entenas liveradon de la
bulteno.

LEA/G-konto: Sonderkonto Kersting

n-ro 416 210-432 Postbank Essen

(BLZ 360 100 43)

Represo de materialo estas permesita, se
la fonto estas indikita.

paco kaj kontraŭagenda, unuopaj homoj de ĉiuj sociaj tavoloj estu kapabligitaj ligi memstare internaciajn kontaktojn, la internacia komerco estu faciligita, ĉiu etna kulturo estas konservenda valorajo, konservi sian etnan identecon gravas

por la individuo, la mondo ne estu dominita de unu etna kulturo, oni kontraŭbatalu rasismojn kaj ksenofobion, ktp. ktp. Neniu el la nomitaj starpunktoj estas universale akceptata en la mondo, neniu do estas politike «neŭtrala» – kvankam larĝa spektro ekde la modera dekstro ĝis la maldekstro povas akcepti ilin, aŭ la plimulton de ili. (Ankaŭ mi konsentas kun la plimulto.)

Mezisma informado laŭ la stilo de la supre kritikita teksto – kiu pli unu-

signife ol kutime alparolas la rondon de konvinkitaj mezistoj – devus esti bona memorigo al ni pri nia politika devo: pretigi informilojn, kiuj alparolu – ankaŭ ne larĝspektre, sed specife, kaj sen la ridinda aserto pri politika «neŭtraleco» – la celgrupon de *diverstipaj maldekstruloj*. Pri ĝi mi certas, ke la nun absolute dominantaj, iugrade eĉ en SAT, informado ne povas logi ĝin.

Gary Mickle

Kie ni staras? Statpriskribo de LEA/G

Laŭ la taskodisigo de peresperanta kaj poresperanta agadoj LEA estas propaganda asocio por Esperanto. Tio estas ĝia ununura tasko. Ĉiuj eblaj rimedoj do devas servi la propagandon de Esperanto.

Tiu ĉi celo nuntempe ne estas atingita.

La *Magazino* ekde kelka tempo aperas plene en Esperanto, do ne plu estas taŭga propagandilo. Tial ni nepre kreu kaj uzu aliajn propagandilojn. Ni ankaŭ konsideru malpliigon de la mono por la *Magazino*.

Dum la lastaj du eldonoj de la *Magazino* oni ekdiskutis pri propagandado de Esperanto pere de faldfolioj. Ne montriĝas partopreno de la LEAanoj en ĉi tiu diskuto. La proponoj kaj ties realigado tro dependas de unuopuloj; la asocio ne alproprigas la iniciatojn, sed ili forvaporigas.

Jam de pli ol unu jaro oni laboras pri renovigo kaj pliampleksigo de la interreta prezento kaj precipe de la TTT-paĝoj de LEA. Montriĝas ankaŭ ĉi tie, kiel nefleksema estas la asocio. Mi ne

komprenas, kiel tiel simplega afero povas daŭri pli ol kelkajn semajnojn. La tekstoj estas pretaj, la paĝoj estas pretaj. Daŭrus nur sekundojn ilin ekfunkciigi.

Ni ankaŭ devas pripensi, ĉu kaj kie estus sence aperigi anoncojn aŭ afiŝojn.

Alia urĝa problemoj estas: Kion LEA povas oferti al siaj ontaj membroj?

Almenaŭ oni sukcesis stabiligi la *Magazinon* kaj ankaŭ enhave ĝin pli-interesigi. Tion konfirmas la kvar novaj abonoj al la *Magazino* en tiu ĉi jaro. Sed ĝuste por la peresperanta laboro laŭ mi S.A.T. pli taŭgas. Peresperanta laboro estas nature tasko de tutmonda asocio, ne de lingvoregiona. La laboro metita en la *Magazinon* povus metite en la *Sen-naciulon* utili al tutmonda legantaro. Krome ĝi maltrafas la taskojn de LEA, ĉar la *Magazino* ja apenaŭ helpas la propagandon de Esperanto.

La *Magazino* havas sencon kaj rolon, se ĝi povas esti utiligata por la celo rekunigi kaj pliaktivigi LEAon. Sed tiu perspektivo povas esti nur kelktempa. En longtempa perspektivo la graveco de la *Magazino* kompare al aliaj projektoj de LEA devas malpligrandiĝi.

La tasko de LEA estas baki novajn esperantistojn kaj krei en neesperantaj organizoj klimaton amikan al Esperanto.

Novajn esperantistojn oni produktas per kursoj. Oni enigis ilin en la movadon per tio, ke oni igas ilin flari la liberan aeron de internaciaj renkontiĝoj. Sed LEA povas nur tre limigite organizi tiajn renkontiĝojn. Tiaj eventoj estas originaj taskoj de S.A.T. Aldone al la nuraj lingvokursoj oni do devas ĉiam ankaŭ provi kapti la novesperantistojn per ofertoj de eventoj. Ĉe tio tute taŭgas ankaŭ multaj eventoj de la neŭtrala movado. Tio havas ĉefe la jenajn avantaĝojn: Oni ne devas okupi sin pri la organizado de la eventoj, la eventoj havas ĝenerale pli altan organizan nivelon kaj pli da parto-

prenantoj ol tiuj eventoj de la neneŭtrala movado.

Certe ofte eblas ankaŭ kombini kurson kun Esperanto-renkontiĝo. Tion provis ĉi-jare GEJ ĉe la IJS. Tio pro organizadaj problemoj ne bone funkciis; sed la ideo mem estas vere bona: Oni invitas al sufiĉe granda internacia renkontiĝo, en kiu samtempe okazas kurso por komencantoj.

Unu projekto, kiun LEA povus utiligi por si, estas la UK99 en Berlino. En ties kadro ĝi povus ekz-e organizi ĉefkunvenon aŭ eble eĉ prelegojn aŭ diskut-rondojn. Ĉe tio la asocio povus apogi sin sur antaŭlaboroj de membroj de la Maldekstra Forumo en Berlino, el kies membroj kelkaj membras ankaŭ en LEA kaj

ĈU VI NE KONAS
LA EMANCIPIĜON DE LA
LABORANTAJ KLASOJ,
KIUN NUR LA
LABORANTAJ KLASOJ
MEM POVAS ATINGI?



NE, SED SE VI ZUMOS
KELKAJN MEZUROJN,
MI PROVOS ŜAJNIGI!



S.A.T. La LEA-eventoj ne nepre devas esti parto de la oficiala kongresa programo, sed ili povus senprobleme esti sciigitaj al la kongresanoj per afiŝoj aŭ faldfolioj. Ankaŭ eblus enplekti en la organizadon de tiaj eventoj S.A.T.on.

Pli problemo estas la baza inform-fluo inter la diversaj LEAoj. Mi opinias pripensinda tion, ĉu ne estu alstrebita revivigi la *LEA-Ligilon*. Ŝajnas al mi, ke la jena realigo estas kaj la plej malmultekosta kaj senpere atinganta la plej multajn LEAanojn: Unu persono estas kolektejo de informoj el la diversaj LEAoj

kaj kompilas el ili suplementon, kiu estas aldonata al la gazetoj de la diversaj LEAoj. Tiel oni povus uzi ekz-e la lastajn du paĝojn de la *Magazino* por tiu ĉi suplemento, kiu peras informojn pri la aktivajoj, diskutoj kaj problemoj en la aliaj LEAoj. Tiu kompilita de unu persono suplemento devas regulateme esti forsendita je po unu ekzemplero al ĉiuj LEAoj. La kostoj estas tiel malaltaj, ke eblas ilin pagi eĉ pure private.

Sebastian Hartwig (980817)

Kelkaj alineoj de ankoraŭ verkota Manifesto de hobiuloj

Se la tradicia esperantista ideologio (TEI)¹ kaj la raŭmismo² vere estus la solaj menciindaj strategiaj alternativoj – kaj oni ofte vekas la impreson, ke stas

tiel – mi serioze penus mallerni Esperanton kaj instigi aliajn ne uzi ĝin.

Ke mi ne faras tion, ŝuldiĝas al la fakto, ke ekzistas laŭ mia konstato du pliaj strategiaj alternativoj, kiuj multe pli allogas min:

¹ Per tiu nomo Markus Sikossek karakterizis la ĝis nun ĉefan movadan tendencon, kiu proponas Esperanton kiel «duan lingvon por ĉiu». Ĝi atendas pliakriĝon de la monda lingva problemoj kaj sekve de tio plian pretecon ĉe internaciaj instancoj konsideri solvoproponojn, eĉ nekonvencian. Ofte la anoj de tiu TEI traktas unuopajn oficialajn agnosketojn kaj afablajn vortojn de aŭtoritatuloj kiel antaŭsignojn de la sopirata «fina venko».

² Oni nomas raŭmismo la tendencon, kiu unue esprimiĝis per la *Manifesto de Raŭmo* subskribita de multaj partoprenantoj de la TEJO-kongreso en la finna urbo Raŭmo en 1980. Tiu tendenco strebas adiaŭi la tradiciajn konceptojn de oficiala agnoskigo de Esperanto, kontestado de la monda rolo de la angla, de «fina venko». Ĝi emfazas la nun ekzistantajn valorojn de la lingvo kaj ĝia komunumo.

- unu *maldekstra*, kiu alstrebas la ĝeneraligon de Esperanto, sed supozas ĝin ebla nur en pli fora estonteco kaj vidas ĝin dependi unuavice de la fortiĝo de progresivaj (egalismaj, internaciismaj, socialismaj k.s.) tendencoj en la mondo kaj ne de kampanjoj ĉe Uno, EU, edukministerioj, politikistoj, ktp., kaj

- unu hobiisma (ŝatokupa), kiu senhonte traktas Esperanton kiel agrablan rimedon por pasigi liberan tempon ĉe la plej diversaj, libervole elektitaj laboroj, kaj la Esperantan komunumon kiel personan amikaron.

Mi ne sen kaŭzo parolas pri hobiismo kaj nomas tiun alternativon *strategia*. Ĉiu, kiu ne estas politikmaniulo, ĝis-medola idealisto aŭ io alia de tiu speco,

agnoskas, ke la plimulto de homoj bezonas psike kaj korpe regeneran liber-tempan aktivadon, kiu povas alpreni la formon de hobbio. Ĉiu esperantisto scias,

Nova registaro

Dum la semajno post la elektoj aperis en la neĉesejoj de la entrepreno, kie mi laboras, ŝildoj kun la proksimuma teksto «Laŭ la direktivo n-ro xyz ĉiu superflua uzado de elektro dum la pintohoroj estas nepre evitenda. Sekve, funkciigado de mansekigiloj, kafaparatoj, vazlaviloj kaj akvoboligiloj inter la 7a kaj 10a horo kaj inter la 16a kaj 19a horoj estas strikte malpermesita.» Dume, oni ĉiutage vidas la ĉefkadrojn de la entrepreno alveturi kaj forveturi per la benzindrunkantoj de la marko BMW, kiujn la direkcia aĉetis por ili antaŭ ne tre longe.

La tempa koincido kun la elektoj estas sendube hazarda: la elektroŝparado en la firmao ne estas ekologie, sed mone motivita. Tamen, mi ne povis ne ekvidi alegorion je la sendube atendebla energiŝpariga politiko de la tiam ĵus elektita, ankoraŭ formiĝanta «ruĝa-verda» registaro – ankaŭ je la socia ordo, kiu plue regos sub ĝi.

Ĉu tian politikon – de ekologiaj ŝparetoj, kiuj trafos unuavice la simplulojn, ĉe senŝanĝa novliberalismo en la ekonomia sfero – ni devos atendi de la nova registaro?

Cetere, la eldiroj de diversaj politikistoj, inkluzive Schröder, pri enmigrintoj en Germanio, ne inspiras fidon pri principa progreso en la politiko koncerne eksterlandanojn, malgraŭ videblaj progresoj en la sfero de la juro pri ŝtataneco. Post kelka tempo ni scios pli.

GM

eĉ se iu aŭ alia sin ĝenas publike diri tion, ke Esperanto tre utilas al siaj uzantoj kiel hobbio. Mi volonte agnoskas, ke Esperanto estas mia hobbio. Hobbio estas afero, kiun oni povas ofensive paroli. Hobiismo ne estas politika agado, sed ĝi havas politikajn implicojn, pri kiuj indas memori.

Unu baza trajto de hobbio estas tio, ke ĝia praktikado implicas laboron. Laboron de kolektado kaj registrado, se temas pri kolektohobbio. Laboron de lertiĝo kaj kapabliĝo ĉe aliaj hobbioj, ekzemple ĉe Esperanto, kiun oni, kiel aliajn lingvojn, neniam ellernas ĝis perfekteco. Laboron vivteni organizaĵojn, klubojn, aranĝi kunvenojn, varbi novulojn, eldoni gazetetojn, ktp. Kutime temas pri taskoj, kiujn la hobiuloj transprenis libervole, kaj ĉe kiuj ili havas altan gradon de persona memstareco kaj liberan elekton inter agadopcioj.

La praktikado de hobbio implicas ankaŭ kunlaboron kun aliaj, kiu (almenaŭ en la kazo de Esperanto, kiun mi konas) plenumiĝas ene de relative neaŭtoritismaj kaj nehierarkiĉaj strukturoj.

Verŝajne preskaŭ ĉiuj, ne nur kalvinistoj aŭ marksistoj, iel rimarkas, ke la laboro estas bezono de la homo, ne nur kiel rimedo por kontentigi aliajn bezonojn, sed mem. Komparu la hobian laboron, kiel supre priskribitan, kun tia profesia laboro, kian multaj – privilegiitaj «laborposten-posedantoj» – konas en kapitalismo: monotona dum tro da horoj, plenumi taskojn ordonitajn de aliaj, plenumi ilin laŭ la maniero, kiun tiuj preskribas, esti traktata kiel heloto, havi precize difinitan lokon en la vicordo de la hierarkio, submetiĝi al konstanta kondiĉado elteni faŝismoidajn sociajn rilatojn determinitajn ne de vera kunlaborado, sed de homaj rilatoj de supereco kaj malsupereco, komandado kaj submetiĝo, unuvorte: korodiĝi psike

kaj karaktere, almenaŭ elmeti sin al la danĝero de tio. La heloto bezonas tial alian, suplementan laboron, kiu pli respondas al liaj aŭtentikaj bezonoj, por kompensi la pene eltenatan enspezigan laboron, kaj tiu suplementa laboro estas por multaj la hobbio. Sen ĝi, la heloto eĉ ne rimarkus la eblon de alikarakterata laboro ol tiu, kiun la kapitalismo (aŭ alia sistemo de klasa regado) organizas laŭ sia interna logiko kaj trudas al li.

La ideo, ke esperantumi per si mem iel valoras, kaj ne nur en konekso kun ĉiom grava, atingenda celo, estas faceto de la raŭmismo, kaj oni devas danki al la formulintoj de la Manifesto de Raŭmo, ke ili vortumis tion. Sed ŝajnas al mi kvazaŭ raŭmisme orientitaj esperantistoj kelkfoje ankoraŭ staras per unu piedo en la marĉo de la «tradicia esperantista ideologio», alivorte en loko, kie raŭmismo ne volas stari. Ili ĉiam ankoraŭ

identigas – tute tradicie – Esperanton kaj ĝian praktikadon kun idealoj kiel paco, interetna kompreniĝo kaj nediskriminacia internacia komunikado, kiujn ĝi nuntempe ne servas en vere signifiga grado kaj laŭ la atendoj de la raŭmistoj ne servos estonte (ĉar Esperanton plue uzos nur la ĝisnuna komunumeto).

Plaĉus al mi, se tiuj, kiuj malakceptas la t.n. «finan venkon» kiel celon, dirus malkaŝe, ke la praktikado de Esperanto por ili estas hobbio kaj ne speco de politika aŭ porpaca agado. Hobiismo ne estas politika agado, kvankam ĝi havas politikajn implicojn, kiuj meritas eksplicitan elstarigon, dum agado, kiu maskeradas kiel politika strebado, dum ĝia fakta ĉefkomponento estas ŝatokupa lernado kaj uzado de rara lingvo, estas mistifikado de la alparolata publiko.

Gary Mickle

Ni citas por vi: el la artikolo «Tiuj, kiuj damaĝas la respublikon» aperinta en SAT-Amikaro (1998 08/09), paĝoj 53-54. Tiu teksto estas Esperanta traduko de artikolo de Christian Jelen aperinta en la framasona Humanisme (1997 12). Verŝajne indas rimarkigi, ke la citaĵoj ne nepre respegulas la opinion de la Magazino-redakcio. Ni dokumentas ĉi tiun artikolon per eltiraĵoj pro la ĝenerala graveco de la temo. (GM)

Tiuj, kiuj damaĝas la respublikon (eltiraĵoj)

Ĉe ni, la nova revolucia espero konsistas en la volo enigi Francion en la multkulturan eraon. Jen estas la nova ideologia plejbono, kiun disvastigas areto da intelektuloj kaj homaj malplimulto, kies influo, dank' al la favoro de grandaj amasinformrimedoj, nekontesteble transpasas ilian nombron. Por tiuj intelektuloj kaj malplimultaj grupoj, la enmigrado anstataŭis la Laboristan klason kiel batalantan avangardon de la Homaro. Oni atribuis al ĝi la taskon regeneri Francion, rejunigi ĉi tiun lastan.

De tio venas la multiĝado de la paroladoj pri la rajto de interhoma diferenco kaj pri la kontraŭrasismo. Aperas pli kaj pli akraj kritikoj kontraŭ la asimiliĝado, tio estas la Franciĝado, ĉar la koncernaj Multkulturismanoj ĝisvolas mallegitimi la Respublikon kaj la nacion.

Usono spertas Multkulturismon laŭ ties plej malbonaj apartismaj ekscesoj: Balkanigado, partigo en tribojn, realaj minacoj por ĉiam rompeblaj ligoj, kiuj formas la nacian memecon. La konflikta

pecetigo ronĝas la konscion pri nacia unueco.

Jen estas tiu multkultureca ideologio, kiun diferencigemaj intelektuloj, artistaj grupoj, parolkomisiitoj de la spektakla profesio, malplimultaj grupoj volus transirigi en Francion.

Tiu kulturo [la Franca kulturo, kiu tradicie estas malfermita al la mondo...] ebligis la intergrigon kaj poste la asimiligon de fremdaj generacioj venintaj sur la teritorion. La Laikeco – rimedo unuigi la nacion en nehomogena lando kiel

Francio – estas ŝirmilo kontraŭ rasismo kaj ksenofobio multe pli efika, ol la rajto de interhoma diferenco. Sed bedaŭrinde, la kreskado de Multkulturismo okazas je la malprofito de la Laikeco, de la valoroj kaj fundamentaj principoj de la Franca Respubliko.

Fine, akrigante la interhomajn diferencojn, intensigante la malamajn rememorojn, rankorojn, kontraŭriproĉojn, antagonismojn kaj malamojn, la kulto por la etnismo endanĝerigas la enlandan pacon.

Ni publikigas ĉi tie resumon pri la Konferenco de IKEK verkitan de Vincent Charlot kaj disponigitan al nia redakcio kune kun aliaj informoj de Roland Schnell (Dankon!). Roland cetere rimarkas en unu el siaj retmesaĝoj: «Tralegante la *LEAG-MAGAZIN*On mi konstatis, ke nur 2 aŭ 3 el 24 paghoj rilatas al Germanio dum la plej granda parto estas interesa por Internacia publiko. Do mi ne komprenas, kiel oni ne faras unu komunan [tutmondan maldekstran] revuon, en kiu la diversaj tendencoj povas havi proprajn paĝojn pro Internaj aferoj.»

11a Konferenco de IKEK en Durban-Corbières (Francio)

Post la sukcesa kunveno por prezenti IKEK en la UK ĵaudon 6-an de Aŭgusto, la 11-a Konferenco de Internacia Komunista Esperantista Kolektivo okazis inter la 9-a kaj la 14-a de Aŭgusto 1998 en Durban-Corbières (Francio).

Ĝi arigis IKEK-anojn el Britio, Francio, Germanio, Hispanio, Italio, Kubo, Rusio kaj Svisio.

Ĝi definitive aprobis la kontrakton subskribitan inter UEA kaj IKEK akceptitan de komitato de UEA en la ĵusa Montpeliera UK. Ĝi komisiis K-don Vilhelmo LUTERMANO reprezenti IKEK en la Kampanjo 2000.

Ĝi diskutis kaj akceptis Agadraporton, regularon aldonotan al la Statuto, elektis la novan estraron. Ni rekontakt-

iĝos kun komunistaj kaj progresemaj partioj kaj kunlaboros en tiu kampanjo por kaj per Esperanto. Ni deziras kunagadi kun ĉiuj en la bataloj por ĉesigi la embargon kontraŭ Kubo kaj kontraŭ la interkonsento nomita 'Multflanka Interkonsento pri Investado'.

Ni ekskursis al Korbiera montaro kaj al marbordo, vizitis Karkasonon kaj Katarion. Ni ĝuis la kantojn de Jacques LE PUIL, kiu afable vizitis nin dufoje la poemojn majstre interpretitajn de nia kuba K-dino Georguina ALMANZA.

La venonta Internacia Konferenco okazos verŝajne en Kubo fine de Decembro 1999 kaj komence de Januaro 2000.

La definitiva protokolo aperos en *Internaciisto* de Novembro-Decembro.

Jen la listo de IKEK-estraro elektita de la 11-a konferenco:

Prezidanto: Faustino CASTANO (Hispanio)

Vicprezidanto: Anne JOHNSON (Britio)

Sekretario: Mayra NUNEZ (Kubo)

Redaktisto: Luiz SERRANO (Hispanio)

Kasisto: Alcino ALVES (Portugaliao)

Eksteraj Rilatoj: Vincent CHARLOT (Francio)

UEA, Kampanjo 2000: Vilhelmo

LUTERMANO (Germanio)

Interreto: Stefan FISAHN (Germanio)

Junularo: Liu XIAO ZHE (Solis)(Ĉinio)

Ankoraŭ senfunkciaj: Stefka

ANDREEVA (Bulgario), Vladimir

BESPALOV (Rusio), Andris NATINJ

(Rusio)

Vincent CHARLOT

Respondeculo pri eksteraj rilatoj de

IKEK

esperant@worldnet.fr

Kelkaj pliaj informeroj pri la IKEK-konferenco:

- Oni konstatis bonan staton de la financoj, sed neceson sanigi la kurantajn IKEK-financojn, ĉar estiĝis deficitado en tiu ĉi jaro.
- La konferenco decidis okazigi la venontan (12an) konferencon de IKEK en Kubo, fine de decembro 1999 ĝis komence de 2000.
- Unu temo de la debatoj estis Kampanjo 2000. Inter la ideoj esprimitaj sub tiu notvorto estis jenaj:
 - verki en *I-isto* pri lingvaj problemoj inter la klasbatalantaj partioj
 - uzi *I-iston* por analizi pasintajn problemojn
 - diskuti kiel konstrui novan komunistan movadon
 - agadi en diversaj medioj kaj varbi por Esperanto en laboristaj partioj kaj sindikatoj

- bezono de pli da plurismo en *I-isto*
- IKEK devus pli trakti medio-protektadon
- per nia kutima agado en la laborista movado por kaj per Esperanto, ni samtempe antaŭenpuŝos Kampanjon 2000.

- Oni esperis diskuti kun Kristiano BAUDE, Francio, (konata kiel 'Kribo', eldonanto kaj redaktanto de la liber-esprima monata gazeto *Laŭte!* kadre de SAT) kaj Gilberto LEDON, Brazilio (redaktinto de la *Liberecana Ligilo* de la Liberecana Frakcio de SAT) pri la temo «Komunaj originoj kaj diversaj evoluoj de anarĥiistoj, komunistoj kaj liberecanoj – kaj nuntempaj eblecoj kunlabori». Sed bedaŭrinde Kribo devis marde, la antaŭplanitan tagon, jam esti hejme pro gastoj alvenintaj por partopreni programon en lia hejmo. Li salutigis la konferencon kaj esprimis sian deziron iam fari tian diskuton kun ni. Kaj Gilberto venis, sed ne je la interkonsentita tempo kaj do, je granda bedaŭro de la Konferenco, maltrafis nin. Venis ĵak LE PUIL kaj Armela LE QUINT, kiuj ankaŭ esperis partopreni tiun diskuton. Sed pro malĉeesto de la du antaŭviditaj diskutpartneroj, tiu diskuto do ne okazis, sed eble ni trovos eblecojn por almenaŭ iomete anstataŭigi ĝin per skriba diskuto.
- Alia temo esperata estis la historio kaj nuntempa realo de kibucismo, kiu ja nepre estas parto de la socialismaj kaj komunismaj idearo kaj movadoj. Cvi ŜOLT, kibucano esperantisto kunfondinta sian kibucon kaj daŭre laboranta kaj vivanta en ĝi, estas eble la plej kompetenta persono por prelegi pri tio kaj diskuti kun ni. Bedaŭrinde li ne povis veni pro aliaj jam antaŭe fiksitaj taskoj, kaj li ne trovis

anstataŭanton. Sed la Konferenco opinias, ke la temo estas kaj restos interesa kaj esperas, ke Cvi Ŝolt povos eble poste ion diri al ni - kaj eble intertempe skribi en *I-isto*.

IKEK cetere fariĝis ĉi-jare (kune kun la Esperantista Internacia Centro de la Civitanoj de la Mondo) kunlaboranta faka asocio de UEA. Ĝian kunvenon (1998 08 06) kadre de la UK partoprenis 50 samideanoj el 11 landoj.

Fine de la pasinta jaro spontane evoluis debato pri SAT, ĝiaj celo kaj politiko en unu el la Esperantaj diskutgrupoj de la Interreto. Multaj partoprenis per unu aŭ du komunikadoj. Pli ofte sin anoncis Yves Bellefeuille (YB) Alan Gould (AG), Sebastian Hartwig (SH) kaj Petro Levi (PL). La debato havas principan gravecon, do ni dokumentas kelkajn erojn ĉi tie. La redakcio iomete redaktis lingve, ĉar la partoprenintoj impete verkis por la kunlegantaj retanoj, ne atendante la gazetforman aperon. (Daŭrigo de la diskuto sekvas en postaj numeroj.)

Kio estas la celo de SAT?

Hartmut Pilch: kio estas SAT?

SH: Sennacieca Asocio Tutmonda. Kontraste al la *peresperanta* organizo UEA, SAT estas *peresperanta* organizo. Ĝia celo estas interalie klerigo de la laboristaro kaj uzado de la sennacieca lingvo Esperanto por la klasbatalaj celoj de ĝi.

AG: La LEA-oj de SAT agas poresperante. Fakte, ambaŭ, SAT kaj la SAT-LEAaro agas trioble, por, per kaj *peresperante*. Klasbatalaj celoj estas nur menciitaj en frakcioj establitaj tiucele.

SH: Sed, kara, la LEA-oj ne estas SAT. Ili rilatas al SAT nur laŭ la Gotenbarga Konvencio. Aŭ ĉu? Kaj ĉu ne estis memdifino de SAT, ke ĝi estu *peresperanta* kontraste al la burĝa UEA?

[pri la eldiro, ke klasbatalaj celoj estas menciitaj nur en certaj frakcioj] Hm. Ĉu? Mi opinias min leginta ion pri klasbatalo en la statuto de SAT. Mi kontrolu.

AG: Reguloj kaj statutoj proponas, praktika realeco disponas.

SH: Nu, ĉu la klasbatalo estas ja menciita en la statuto aŭ ĉu ne?

AG: Vi sonas kiel senatano Joe McCarthy. La rilata paragrafo el la SAT-statuto, skribita antaŭ pli ol sepdek jaroj, estas jene:

«SAT, ne estante partipolitika, sed nur kleriga, eduka, kultura organizo, celas, ke ĝiaj membroj estu komprenemaj kaj toleremaj rilate al la politikaj kaj filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiuj sin apogas la diversaj klasbatalaj laboristaj partioj kaj sindikatmovadoj; per komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe membroj la dogmiĝon de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj.»

Pli grave, nek klasbataloj, nek sindikatoj estis menciitaj dum la ĉi-jara SAT-kongreso en Augsburg. Kio estis menciita inter aliaj aferoj estis kiel labori kune kun UEA cele al la bono de Esperanto. UEA-kongreso esprimis samajn esperojn. Ni devas decidi, ĉu Esperanto povas kune alfronti la defiojn de la estonta jarmilo, aŭ ĉu ni preferus vivi kaj morti en pasinta epoko.

Ĉi tio estas unu elemento de la informa laboro de SAT-Amikaro, nome la Service de Presse, la gazetaran servon de tiu organizaĵo, kiun redaktas Henri Masson. Ĝi aperas ĉiumonate kiel suplemento de SAT-Amikaro: duflanke presita A4-folio, kiu franclingve kaj en jurnaleca stilo argumentas kaj prezentas aktualaĵojn pri Esperanto – en Francio kaj la mondo. Jen la oktobra eldono de la «lastaj novaĵoj», ĵus prenitaj el la Interreto kaj kiuj konsistigas nur parton de la Service de Presse. Certe indos fari pliajn tradukojn el la ampleksa materialo, kiun produktas SAT-Amikaro, kaj elmeti ilin el la pritakso de nefranclingvanoj. La tradukinto petas indulgon pro eventualaj tradukaj fuŝetoj – lia franca lingvoscio povas ankoraŭ pliboniĝi.

SAT***
AMIKARO

Service de Presse

DERNIÈRES
NOUVELLES

Es regt sich überall –
Letzte Nachrichten

★ Anlässlich des 50. Jahrestags der Allgemeinen Menschenrechtserklärung sammelt das Japanische Esperanto-Institut (Tokio) Unterschriften für eine Bittschrift, die auf der Webseite <www.esperanto.or.jp/jei/> zu finden ist. Diese wird anschließend an den Sitz des Esperanto-Weltbundes (Rotterdam) weitergegeben und von dort am 10. Dezember – dem Jahrestag – dem Uno-Hauptquartier in New York übermittelt.

★ „Die Tatsache, daß keine politische oder Wirtschaftsmacht Esperanto unterstützt, ist keine Schwäche, sondern eine Chance für die Zukunft.“ So endet ein Artikel der österreichischen Tageszeitung *Standard* (24.3.98; Auflage 380 000) über ein Gespräch, das sie mit Herbert Mayer, Direktor des Internationalen Esperanto-Museums (einem integralen Bestandteil der Österreichischen Nationalbibliothek), geführt hat.

★ Der produktivste ungarische Schriftsteller, István Nemere, der dieses Jahr seinen 200. Roman auf ungarisch veröffentlicht hat, schreibt auch auf Esperanto: bis heute sind es 16 Buchtitel.

★ Die letzte Ausgabe des Budapester Telefonbuchs enthält die Telefon-Gebrauchsanweisung

auf ungarisch, englisch, deutsch, französisch, italienisch, russisch und Esperanto.

★ Die tschechische Kongreß- und Ausbildungsagentur KAVA-PECH veranstaltet in Prag vom 11. bis 13. November ein Kolloquium über die Anwendungen des Esperanto in Wissenschaft und Technik. Der Direktor und Inhaber von Kava-Pech, Petr Chrdle, schätzt die Verteilung der Sprachen, die er beruflich verwendet, folgendermaßen: tschechisch 30%, englisch 30%, Esperanto 30%, deutsch 10%. <chrdle@kava-pech.cz>

★ Die Webseite <www.esperanto.se> des Schwedischen Esperanto-Bundes hat am 17. August den 500 000. Besuch registriert. Bis die Zahl von 100 000 erreicht wurde (Februar 1996-Mai 1997) mußten 15 Monate vergehen, und 400 000 kamen in den folgenden 15 Monaten zusammen. Die meisten Besucher sind Nicht-Esperanto-Sprecher.

★ Nach der endgültigen Zählung waren nicht 67, sondern 70 Länder auf dem Esperanto-Weltkongreß in Montpellier vertreten.

★ Auf 89,4 MHz im Gebiet von Paris wird aus Radio Liberaire freitags zwischen 18 und 19 Uhr Radio Esperanto. Eine Broschüre mit dem Titel *La plus rebelle des radios, c'est Radio Liberaire* [Der rebellischste aller Sender, das ist Radio Liberaire] stellt den Sender, der jetzt neue Studios hat, vor. Sie kostet 30 FRF: Radio Liberaire, 145, rue Amelot, 75011 Paris.

★ An einem der Hauptverkehrsadern von Montréal hat Julie Martel ein Café eröffnet, und um zu unterstreichen, daß die Gerichte und Getränke des Cafés aus den verschiedensten Teilen der Welt stammen, hat sie es „Café Esperanto“ ge-

tauft. Es wird auch der bevorzugte Veranstaltungsort und Treffpunkt von ortsansässigen und durchreisenden Esperanto-Sprechern sein. Café Esperanto, 250, av. du Mont-Royal Est, Montréal QC H2T 1P5, Québec, Kanada.

Spielend erwachsen werden

Die Münchner Stadtverwaltung veranstaltet alle zwei Jahre unter dem Namen „Mini-München“ eine Ferienaktivität für Kinder zwischen 7 und 15. In Mini-München haben die Kinder ein eigenes Parlament. Eine Akademie ermöglicht den Erwerb von Wissen und Erfahrung auf verschiedenen Gebieten, sei es durch Arbeit oder Lernen. Auch Esperanto gehört dazu. Das wird mit Gutscheinen belohnt, die zur Teilnahme an anderen Aktivitäten berechtigen, wie an denen eines Gasthofs, eines Taxis, eines Geschäfts, einer Bank usw. Hat das Kind vier Stunden gearbeitet und gelernt, kann es sich als Vollbürger einschreiben lassen, wählen, für das Abgeordnetenhaus kandidieren, ein eigenes Gewerbe eröffnen...

Die Münchner Universität spielt bei diesem Versuch eine Hauptrolle. Sie gibt den Kindern eine Möglichkeit, Berichte über das zu schreiben, was sie interessiert. Der Münchner Esperanto-Klub nimmt aktiv und finanziell an dieser Initiative teil und appelliert an die Esperanto-Sprechenden, diesem von großem Bildungswert geprägten Experiment auch ihre Unterstützung zukommen zu lassen, z.B. durch Besuch der Webseite <www.minimunich.musin.de>, durch Ermutigung und Grüße an die Adresse <kinderforum@minimunich.musin.de>, durch Korrektur von Hausarbeiten, usw.

Anmeldungen bitte bei Fritz Hilpert: Tel./ Fax (089) 686 995, E-mail <vitoria@metronet.de>

Ein Politiker staunt

Der ehemalige belgische Ministerpräsident Leo Tindemans, in Belgien als „Monsieur Europe“ bezeichnet, meint, daß die Esperanto-Informationskampagne bei den Europaparlamentariern absolut wert sei, weiterverfolgt zu werden, und zeigte sich erstaunt über die zahlreichen Kontaktmöglichkeiten mit China, Japan und Korea.

Leo Tindemans meint, daß soziale Fragen im Moment die erste Priorität der Abgeordneten seien, sagt aber auch, daß die Sprachprobleme wachsen werden durch den Beitritt neuer Staaten

zur Europäischen Union wie z.B. Ungarn, Polen, Estland (es ist bemerkenswert, daß Esperanto in diesen drei Ländern gut verwurzelt ist – der polnische und der estnische Rundfunk senden auf Esperanto).

Leo Tindemans nimmt mit Befriedigung zur Kenntnis, daß die Esperantisten Idealismus mit Praxis verbinden, was er für etwas sehr Seltenes hält.

Ein Vorstoß in Asien

Vier Verbände junger Esperantisten in Asien haben auf einem Kongreß in Peking beschlossen, ihre Anstrengungen in einer asiatischen Esperanto-Bewegung zu vereinen. Die Esperanto-Redaktion von Radio China International hat eine Abordnung von 40 Teilnehmern empfangen. Kontaktgesuche und Ermutigung an:

- Japana Esperanto-Junularo (JEJ), ĉe Nihon Esperanto, Gakkai Wasedamati 12-3 Sinzyuku-ku Tokyo, JP-162-0042 Japan. <junuloj@po.teleway.ne.jp>
- Ĉina Junulara Esperanto-Asocio (ĈJEA), P.O. Kesto 825, Beijing, China, CN-100037. <cri@gjdt.cri.cngb.com>
- Korea Esperanto-Junularo (KEJ), 1601 Kangbyun Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul, Korea. <kejano@hitel.net>
- Honkonga Junulara Esperanto-Asocio (HKJEA), 4/B Wah Kin Mansion, 18-20 Fort Street North Point, Hong Kong, Honkongo, China. <hkjea@hotmail.com>

Die Tageszeitung *The Japan Times* hat einen langen und positiven Artikel über Esperanto und über das neulich erfolgte Erscheinen eines Videofilms *En somera vilao* veröffentlicht.

Comme l'eau vive...

Ein Star wurde zum Esperanto-Weltkongreß in Montpellier eingeladen, der Sänger und Komponist Guy Béart. Jetzt hat er den Zeitungen *La Dépêche du Midi* und *Dauphiné Libéré* (9.8.) ein Interview über Esperanto gegeben, das ihm sein Vater, ein Bücherrevisor und großer Reisender, beigebracht hat.

Guy Béart bleibt der Idee des Esperanto verbunden, obwohl Freunde versucht haben, ihn abzubringen: „Es ist verflixt! Englisch ist Sprache der Wirtschaft. Die Wirtschaft wird von den Staaten geregelt. Die Staaten werden durch Mafias beherrscht. Verflixt!“

Für Guy Béart kommt es nicht in Frage, die Hände in den Schoß fallen zu lassen und sich in Fatalismus und Resignation zu ergeben: „Wenn das Geld alles beherrschen darf, ist es das Ende der Menschheit! Das wird die Entwicklung von Barbarei bedeuten, die man schon jetzt sieht, in diesem Augenblick. (...) Ich glaube, daß es bei den Menschen ein Brüderlichkeitsgen gibt. Und die Welt wird gerettet, nicht durch einen einzigen Menschen, sondern durch alle.“ Ein Geist, der dem des Nationeunabhängigen Weltbundes (SAT) angenähert ist. Dessen Kongreßresolution von Odessa warnt vor den Bedrohungen, die von den religiösen, nationalistischen und politischen Fanatismen und von dem mafiosen System, das unter dem Namen Multilaterales Investitionsabkommen usw. eingerichtet wird, ausgehen, und ruft dazu auf, sie zu widerstehen.

Beispiellos

Erstmals in der Geschichte des Esperanto und des 1908 gegründeten Esperanto-Weltbundes ist ein Afrikaner in den Vorstand dieser Organisation hineingewählt worden. Es handelt sich um Gbeglo Koffi aus Togo, der bereits mehrere Werke auf Esperanto veröffentlicht hat, darunter ein Lehrbuch, und eine der Säulen der Esperanto-Bewegung in seinem Land ist.

Berlin

Eine Premiere im wiedervereinigten Deutschland: Berlin wird 1999 den 84. Esperanto-Weltkongreß ausrichten. SAT geht zur Kur, indem er seinen Weltkongreß am berühmten Warmbäderkurort Karlovy Vary (Karlsbad) in Tschechien abhält.

Der 54. Kongreß von SAT-Amikaro findet in Glay statt, im Gebiet von Montbéliard (Doubs).

Von Thiers zu Jospin: eine Geschichte der Fauxpas

„Wir brauchen endlich mal eine Sprache für die allgemeine Kommunikation, und da das nicht Esperanto sein wird, eine Sprache, die einige anhand von allen Sprachen erfinden wollten, wird diese ohne Zweifel Englisch sein. Trösten wir uns aber: weil Englisch von allen verwendet wird, ist es eine Sprache, die übel zugerichtet wird und die ihre ursprüngliche Schönheit verlieren wird, während Chinesisch und Französisch ihre Reinheit bewahren werden, wobei das keine Reinheit eines wissenschaftlichen Labors sein sollte. Sie werden nach Englisch eine zweite

Fremdsprache brauchen. Ich rate, Französisch zu wählen.“

Dieser Auszug aus einer Antwort von Lionel Jospin an Studenten in Hongkong, der am 26. September durch France Info verbreitet wurde, ist entlarvend: die Notwendigkeit einer universalen, oder wenigstens einer internationalen Sprache ist – endlich! – amtlich anerkannt.

Dieser ehemalige Lehrer macht zahlreiche Fehler in unserer Sprache, und angesichts einiger seiner oben zitierten Sätze („il faut pas“) fällt es schwer, von ihrer „Reinheit“ zu sprechen. Ein fauxpas! Er benutzt Englisch, spricht sich munter für diese Sprache aus, spricht es schlecht und hat diesem Englischlernen viel Zeit gewidmet, zulasten von Französisch.

Was seine versuchten Prophezeiungen angeht, so sind sie nicht ohne Beispiel. Der erste Präsident der französischen 3. Republik, Adolphe Thiers, sagte über die Eisenbahn: „Das ist ein schönes Spielzeug, das nicht lange erfolgreich sein wird.“ Er änderte seine Meinung später: „Ich gebe zu, daß die Eisenbahnen das Reisen etwas erleichtern werden, wenn man ihre Verwendung auf sehr kurze Strecken in der Nähe von Großstädten, wie z.B. Paris, beschränkt, aber lange Strecken werden nicht nötig sein ...“

In der Zeit, als römische Zahlen am meisten verbreitet waren, erschien es abstrus, arabische Zahlen zu befürworten.

Da er einen Computer nicht bedienen kann, kann Jospin nicht ohne fremde Hilfe feststellen, daß Esperanto in der Gegenwart existiert – etwa durch Anschauen der 32-sprachigen Webseite <http://www.esperanto.net> – und daß es im Angesicht von solchen Beweisstücken von einer mindestens so beschränkten Urteilsfähigkeit wie der eines Thiers zeugt, wenn man von ihm in der Vergangenheit spricht.

Für die Kinder von Gorazde

Gaby und Nicole aus Perros-Guirec bzw. Morlaix kommen von Gorazde in Bosnien zurück, wo sie sich drei Tage lang mit ihren Freunden getroffen haben. Solche Besuche sind ein großer Trost für die Bevölkerung, die sich durch die restliche Welt vergessen fühlt, besonders für die oft durch schreckliche Erfahrungen traumatisierten Kinder. Nicole ist schon mehrmals in diese Enklave gefahren. Gaby, die mehr Erfahrung hat, konnte den Schülern, die

darum nochmals gebeten hatten, ungefähr fünf Stunden Esperanto-Unterricht erteilen.

Beide fühlten sich sehr glücklich bei diesem Erlebnis. Gaby hofft sehr auf eine Rückkehr und verweist auf die „in Gorazde erhaltenen wunderbaren Ergebnisse, die in nur einigen Tagen durch die Direktmethode erzielt wurden: Zeichnen und Gestikulieren (anders ging es sowieso nicht, da ich nicht mehr als drei Wörter der Landessprache kann)“. Weiter sagt sie:

„In zwei Sitzungen hatten die Kinder die Endungen des Substantivs, des Adjektivs, des Verbs in der Gegenwart, in der Vergangenheit, im Imperativ verstanden; sie hatten die Bildung der Mehrzahl des Substantivs und des Adjektivs begriffen, sowie den Sinn der Nachsilben *-in-*, *-id-* und *-eg-* und der Vorsilbe *mal-*, die persönlichen Fürwörter, die besitzanzeigenden Adjektive, außerdem einige Vokabeln gelernt, sowie Substantive, Adjektive, Verben, kleine Wörter wie *la, kun* usw.“

Die Akkusativendung *-n* hat die Kinder zunächst verwundert, aber dank einiger Beispiele haben sie sie dann verstanden (...).

Durch ein Lied (aus dem *Junulkurso: Mi estas muzikanto...*) und zwei Gedichte (die zuerst auswendig gelernt wurden, bevor sie verstanden und immer wieder gelesen wurden) erreichten wir viel. Die Zahlen bis 1000 wurden auf der ersten Sitzung durchgenommen. Bei der zweiten hätten wir schon Lotto spielen können.

Ich bin erstaunt darüber, wie unermüdlich die meisten der 10- bis 13jährigen Kinder waren. Die zweite Mädchengruppe hat uns bei der Abreise auf Esperanto geschrieben: „Wir sind traurig, daß die Esperanto-Schule zu Ende ist. Ihr fahrt weg. Wir lieben Euch, Nicole und Gaby“. Trotz einiger verständlicher Fehler in der Grammatik ist die Botschaft angekommen.

Warum nicht diese Sprache, die den Kindern hier wie dort so weite Horizonte öffnet, in der Zeit der Weihnachtsferien anbieten? Es ist Zeit, nachzudenken.

Namensmißbrauch

Die Bezeichnung des Englischen als ein „Esperanto“ erscheint ab und zu in Artikeln oder Erklärungen von Personen, die beides aus Mangel an Wissen über Esperanto gar nicht vergleichen können. So haben die Leser des *Nouvel Observateur* (10.-16. September, S. 10) lesen können: „da Esperanto ganz einfach exi-

stiert, und daß es Englisch ist...“, was einem Namensmißbrauch fast gleichkommt.

Esperanto, ursprünglich „internationale Sprache“ genannt, wurde zu gerade diesem Zweck konzipiert. Das trifft für das Englische nicht zu, das die Muttersprache von 8% der Weltbevölkerung ist und sogar in seiner desinfierten Version Träger der Kultur, der Denkweise und Weltanschauung der Länder ist, deren National-sprache es ist. Frei von entfremdenden Wirkungen, ist Esperanto diesem Englisch sehr überlegen, eindeutig leichter und wirtschaftlicher zugänglich.

Esperanto läßt reichlich Zeit zum Lernen von anderen Stoffen, einschließlich Sprachen. Für das Englische, das infolge seiner Lernerschwernisse acht- bis zehnmals mehr Zeit beansprucht, trifft das nicht zu. Es ergibt sich eine Hemmwirkung für die, die an seinem Studium gescheitert sind, d.h. für die große Mehrheit. Will man die Schulranzen leichter machen und Sprachenlernen schmackhaft machen, sollte man eher einen Blick auf das Esperanto werfen.

Der Benutzer des Esperanto ist an kein bestimmtes Land gebunden. Er ist frei, während das erste Zielland und der erste Austauschort für Englischlernende am häufigsten ein englischsprachiges Land ist. Hieraus ergibt sich ein kulturelles Ungleichgewicht, das schwerwiegende gesellschaftliche, wirtschaftliche und politische Auswirkungen auf Weltebene hat.

Mit Esperanto ist eine wirkliche Zweisprachigkeit für praktisch alle Bevölkerungen möglich. Anders sieht es mit Englisch aus, das nur von einem kleinen Prozentsatz derer, die es gelernt haben, wirklich beherrscht wird.

Das ist leicht zu verifizieren: man bringe Menschen ohne gemeinsame Sprache zusammen, um die Wirksamkeit des Englischen einerseits und des Esperanto andererseits zu beurteilen. Wer wird sich trauen?

Zum Schluß: Wer dem Englischen die hervorragende Rolle des Esperanto zuschreibt, der möge das oben beschriebene Experiment von Gorazde mit Englisch versuchen.

Henri Masson: <esperohm@club-internet.fr>

laŭ la eldono de 1998 10 09: la originalan tekston de Henri Masson tradukis Gary Mickle kun helpo de Holger Netzel

Berlinaj esperantistoj ĝuis antaŭ kelkaj monatoj – komence de majo – pensprovokan prelegon de d-ro Bociort pri la estetikaj funkcioj de la beletraj temoj. D-ro Bociort serĉas respondon al la demando, kiel la artisto kreas belecon, kaj konstatas, ke la kriterioj de aprecado de artverko estas ofte nekonataj. Li elnombris la plej gravajn laŭ li komponantojn de artverko – i.a. temon, ideon, eventojn, ordon, lingvon/stilon kaj versfaradon (ĉe poezia verko) – kies strukturo kaj interrilato donas la valoron al artverko, konstatas tamen, ke nuntempe preskaŭ ĉiu el la nomitaj kriterioj estas pridubata, kiel oni ankaŭ ofte neas ĝenerale la progreson en la literaturo kaj arto. Prof. Bociort konstatas la ligitecon de arto al idealoj kaj taksas grava la unuigon de la plaĉo kaj la utilo ĉe verkado. Ĉi tiun kontribuon ni ricevis post tiu prelego.

Aldone al la estetika debato

de I. F. Bodert

Pluraj interesaj demandoj venis post mia komunikaĵo (Berlin, la 4an de majo ĉi-jare) *La estetikaj funkcioj de la beletraj temoj*. Poste mi rimarkis, ke unu demando restis sen respondo. Juna partoprenanto, interesiĝanta precipe pri muziko, dufoje aludis la problemon pri la **mezurebleco** de la estetika valoro. Ĝi estas vere moderna demando. Necesas almenaŭ jenaj rimarkoj:

- Mezuri oni povas nur objektivajn ecojn de la fenomenoj, sed la valoro (ĉiu ajna) havas – kiel jam menciite en la diskutitoj – ankaŭ subjektivajn komponantojn: interesojn, celojn, sentojn, tradiciajn kutimojn, kulturecon ktp. de la aprecanto, kaj tiuj estas laŭ hodiaŭaj sciencaj atingoj nemezureblaj.

- Mezuri la ecojn de la fenomenoj estas jam malnova celo de scienca traktado de la realo. Pitagoras interesiĝis pri la matematikaj rilatoj en muzikaj komponaĵoj. La epoko de Descartes kaj Leibniz denove esperis enkonduki kalkulojn en la analizadon de la fenomenoj: *ergo calculus* (lat. «do ni kalkulas»).

- Tamen, tiu ŝarĝo estas ege malfacila. Hippokrates ne povis mezuri la temperaturan de la homa korpo, ties sango-

premon, la pulson. Eĉ hodiaŭ la kuracistoj ne povas mezuri la gradon de malsaneco de iu homa organo, kvankam ili kun certeco povas konstati la malsanon.

- Ankaŭ en la estetiko kaj historio de la artoj kaj beletraj ni povas konstati la objektivajn valorojn de la homaj kreaĵoj, alikaze ni ne povus distingi majstroverkojn disde kiĉo. Jam estus granda atingo, se ni povus mezuri almenaŭ la objektivajn estetikajn komponantojn. Al tiu celo strebas hodiaŭ la matematika poetiko (Solomon Marcus) kaj la estetika informadiko (Helmar Frank). La problemo estas ankoraŭ nesolvita, ĉar eĉ la objektivaj ecoj estas nesufiĉe konataj, kaj ties mezurebleco estas malfacila.

- Ni estas do devigataj analizi la beletrajn verkojn nur helpe de kvalitataj modeloj, ne de kvantaj, sed oni ne mal-esperu. Ĝis en la 18a jarcento ankaŭ la fiziko ne havis fakte kvantajn (matematikajn) modelojn kaj instrumentaron. Ni ne forgesu, ke en la estetiko kaj arto multaj fakuloj eĉ ne kredas, ke en «spiritaĵoj» ekzistas objektivaj kriterioj por mezuri la gradon de majstrecio. La franca literaturkritikisto A. Thibaudet asertis, ke ĉiu kritikisto mem donas la

kriteriojn de la aprecado. La lingvistiko nur en nia epoko komencis uzi kvantajn modelojn.

• Konklude, la objektiva valoro de la beletra verko kaj la ebleco mezuri ĝin estas du tute diversaj problemoj. La

unua estas aĵo sendependa, apartenanta al teorio pri ekzistado (ontologio); la dua estas scienca atingajo, apartenanta al teorio pri konado (epistemologio aŭ gnoseologio).

Recenzo

Igor Newerly: Interparolo en la frukt-gardeno la 5-an de aŭgusto.

El la pola tradukis kaj eldonis: Zofia Banet-Fornalowa, Varsovio, 1997. (Eldonita kun subteno de la FAME-fondaĵo. Grafika prilaboro: Elżbieta Kuczara. Kompostis kaj presis: Josip Pleadin, Đurđevac, Kroatio, 1996)

Post enkondukaj linioj pri Igor Newerly (1903-1987), iama kunlaboranto de Janusz K o r c z a k, la 60-paĝa libreto priskribas – en formo de fikcia interdiskuto inter la aŭtoro kaj grupo de gejunuloj – la vivon, idearon kaj sorton de la konata edukisto.

La elektita formo de skribado evitas eblan monotonecon, kiu ĉe tia temo facile povus ekregi, sed donas al la leganto vivecan, klaran kaj kortuŝan bildon de la pensoj kaj profesiaj principoj de Korczak. Helpi al infanoj trovi sian vojon tra la vivo, eduki ilin en siatempe «moderna» maniero, do, sen perforto, sed per la forto de konvinko kaj per propra ekono, tio estis lia devizo. Tion li praktikis, post studado de medicino, finfine en du diversaj orfohejmoj (por judaj resp. polaj infanoj).

Je la fino, kronologio de la vivo de J. K. (1878/79 - 1942) informas pri de-

taloj antaŭe ne menciitaj. Ĝi finiĝas kun la 5-a de aŭgusto 1942 – dato de la fortransporto de K. kun «siaz» infanoj el la getto de Varsovio al Treblinka, kie ili estis murditaj de la naziaj krimuloj.

La tradukintino – laŭ impresado de la recenzinto – bonege superis obstaklojn lingvaj: Nekutimaj nocioj pri metiaj apartaĵoj aŭ malofte uzataj nomoj de plantoj ktp. trovis adekvatajn esprimojn en Esperanto.

La formato (14,4 × 20 cm) estas facile «manumebla»; presmaniero agrabla faciligas la legadon. Kelkaj preserar(et)oj estas neglektendaj.

La libreto meritas esti legata de ĉiu, kiu inklinas al pedagogio – sed ne nur! Ĝi estas havebla en la libroservoj de UEA kaj de FEL.

H. Rodewig, 98 08

Esperanto-elsendoj de Radio Polonia: La nova vintra programo

- 06.30: nur per satelito
- 15.30: 41,18 m (7285 kHz); 41,09 m (7305 kHz) + satelito
- 20.00: 41,64 m (7205 kHz); 49,22 (6095 kHz) + satelito
- 22.30: 40,93 m (7330 kHz); 41,27 m (7270 kHz); 49,22 m (6095 kHz); 49,71 m (6035 kHz)

La redakcio ricevis de la LEA-Komitato (k-do Guy Cavalier, 3 Rue de Nancy, F-93800 Epinay) konsilaron ellaboritan de Germain Pirlot pri eventualaj agadoj ĉe eŭropaj parlamentanoj. Partoprenon en tiu agado proponis la Itala LEA antaŭ unu jaro, kaj mem jam komencis. Parenteze dirite, tio estas agadkampo, kiun LEA/G nuntempe ne plugas. Ĉu ni taksas ĝin grava, kaj ĉu iu membro volas aktivigi tiutere? Se jes, mi (GM) povas sendi al vi la liston de eŭro-parlamentanoj kun nomoj kaj partia aparteno.

Agado ĉe eŭro-parlamentanoj – laŭspertaj konsiloj

- Nepre ni estu **tre realismaj**:
 1. ni komprenu, kiam unuaj reagoj estas negativaj; ofte EP-anoj estas mise informitaj kaj kelkfoje kontakti ilin stranguloj per neraciaj argumentoj;
 2. ni bone konsci, ke EP-ano ne havas tempon tempon por legi ĉion, kion li ricevas – temas pri plurdekoj da poŝtaĵoj ĉiutage! Ĝenerale, legi ilin estas tasko de sekretario. Sekve, ni ne faru al ni iluzion! Nur iom post iom ni trafos nian celon. Ekzemple: en julio 1996 mi ricevis la unuan reagon de s-ino A.N., belga EP-anino, kvankam mi informis ŝin jam 7-, 8-foje de post la lanĉo de la inform-kampanjo en marto 1995.
- **Nepre ni evitu polemikon** kaj akran esprimmanieron; tio ĉiam malbonege impresas kaj ofte malebligas postajn kontaktojn.

Pli ol rebati ni atentigu pri eraroj, zorgante pri afabla etoso. ekzemple: «Pri tiu punkto oni erare informis vin. Fakte, la realo estas alia... Kiel vi povas konstati ankaŭ laŭ la aldonita dokumento...»
- Unue ni klopodu **kroĉi intereson** per tre mallonga letero kun trafa argumento; ni ne aldonu plurajn, sed nur unu, du dokumentojn.
- Ne sufiĉas vekti intereson, nepras **nutri ĝin** per pli malpli regula sendado de informoj.
- Fakte, nia unua kaj gravega paŝo estu akceptigi la ideon, ke Esperanto povus helpi por solvi la lingvan problemaron en Eŭropa Unio, sen damaĝo por aliaj lingvoj kaj kulturoj.

Ni ne koncentru nian argumentadon nur al la lingvaj problemoj sine de la eŭropaj parlamento kaj instancoj, eĉ se ni rajtas aludi ilin (pro diversaj kialoj, Esperanto ne kapablas solvi ilin tuj).

Male, ni substreku la **propedeŭtikan valoron** de Esperanto por la eklernado de fremdlingvoj kaj por la starigo de ĉiudirekta plurlingvismo je eŭropa nivelo, en reciproka respekto de la lingvo, de la kulturo, de la digneco de ĉiuj.

La lingvaj problemoj ne limiĝas je la 626 EP-anoj, sed ilin frontas ĉ. 360 000 000 eŭropanoj!
- **Klare** ni menci, ke la celo estas **diskonigi** la opiniojn, aparte al la eŭropa esperantistaro.
- Ni **diskonigu pozitivajn diraĵojn** de unu al la aliaj, por kuraĝigi, pruvante, ke ankaŭ aliaj favoras Esperanton.
- Ni **ne aperigu negativan** respondon, ĉar, onte, tiu EP-ano (aŭ alia politikisto) pli malfacile povos ŝanĝi sian

ideon, se jam ĝi estis diskonigita. Tiam ni klopodu, kun helpo de kompetentuloj, rebati objekte, singardeme por ne rompi la dialogon.

Se ni diskonigas malfavoran opinion de EP-ano, tio povus instigi aliaj samopinii. Nia celo estas «konstrui», neniel neniigi nian propran laboron, disdonigante informojn, kiujn malamikoj povus uzi kontraŭ nin mem.

Psikologie, estas pli pozitive diri, ke 83 (13,25%) EP-anoj el 626 akceptas la ideon [cifero je la 3a de aŭgusto], ol diri, ke 543 ĉu havas neniun opinion, ĉu kontraŭas nian ideon. La nombro ne ŝanĝiĝos, sed la rezulto estos multe pli negativa ĉi-kaze.

- **Kunagado** – Ju pli da homoj kunagados, des pli da rezultoj ni atingos! Ĉefe en grandaj landoj, nepras trovi ĉu individuojn, ĉu grupojn por, sub gvidado de «landa kunordiganto», pri-

zorgi kontaktojn kun kelkaj EP-anoj ĉu laŭ regiono, ĉu laŭ partio.

Kaze de kunlaborado de landa Esperanto-asocio (tio ja okazas!), povus esti komisiito pri Eŭropa Unio. Estas preferinde kontakti EP-anojn nome de landa asocio ol kiel simpla civitano.

- Singarda, realisma, objektiva interveno de regionaj samideanoj povas pozitive influi la sintenon de EP-ano; ekz. en Belgio, R. Chanterie enlistiĝis post interveno de loka esperantisto.
- Ofte ne necesas sendi longajn leterojn; 20-linia letero kun trafega argumento pli valoras ol dupaĝa babilado. Gravegas ankaŭ **diskonigo** al EP-anoj de ĉiu nova listo, por ke ili mem konstata la progreson. Tio povas havi pozitivan rezulton, ekz. loka brita EP-ano G. Watson ekinteresiĝis pri nia agado pro la fakto, ke la belga W. De Clercq jam troviĝas sur la listo!

Eŭroparlamentanoj (stato: 1998 07 01)

laŭ la lando:

rango	lando	EP-anoj por E-o	EP-anoj entute	por E-o en %
1	Irlando	14	15	93,33 %
2	Belgio	16	25	64,00 %
3	Britio	30	87	34,48 %
4	Italio	20	87	22,98 %
5	Svedio	4	22	18,18 %
6	Luksemburgio	1	6	16,66 %
7	Francio	11	87	12,64 %
8	Finnlando	2	16	12,50 %
9	Hispanio	7	64	10,93 %
10	Aŭstrio	2	21	9,52 %
11	Germanio	8	99	8,08 %
12	Portugalio	2	25	8,00 %
13	Nederlando	2	31	6,45 %
14	Danio	1	16	6,25 %
15	Greklando	0	25	0,00 %
sume		120	626	19,16 %

laŭ la politika grupo:

rango		politika grupo en la Eŭropa Parlamento	EP-anoj por Esperanto	EP-anoj entute	por E-o en %
1	UPE	Unio por Eŭropo	15	56	26,78 %
2	V	Verduloj	7	27	25,92 %
3	ARE	Alianco Radikala Eŭropa	5	20	25,00 %
4	ELDR	Eŭropaj Liberaluloj Demokrataj kaj Reformantoj	10	41	24,39 %
5	PSE	Partio de la Socialistoj Eŭropaj	49	215	22,79 %
6	PPE	Popola Partio Eŭropa (kristandemokrata)	27	180	15,00 %
7	GUE / NGL	Eŭropa Unuiga Maldekstro / Nord-Verda Maldekstro	3	33	9,09 %
8	NI	ne enskribitaj	3	36	8,33 %
9	I-EDN	Sendependuloj por Eŭropo de la Nacioj	1	18	5,55 %
entute			120	626	19,16 %

- Antaŭdankon pro viaj propraj rimarkoj kaj laŭspertaj sugestoj por plibonigi tiun «konsilaron».

Germain Pirlet (1996 08 03)

Forpasis amiko

Alfred Conzeth (1913-1998) ne plu vivas

Ekzistas en la Esperanto-movado tiaj homoj, kiuj kvazaŭ neglektante sian aĝon kaj sanstaton laboras plendediĉe por la Movado ĝis siaj lastaj vivo-tagoj. Al tiuj apartenis Alfred Conzeth; homo ĉarma, nobla kaj bonkora, kiu forpasis la 16an de majo en Mettmann.

Kuŝas antaŭ mi kelkaj informoj, kiujn li, post kelkfoja mia peto, sendis, ĉar mi deziris fari kun li intervjuon. Nur kelkaj frazoj, ĉar li – homo ege modesta, tute ne opiniis, ke oni devas pri li okupiĝi. Bedaŭrinde, la intervjuo jam neniam aperos..., kaj devintus aperi, ĉar Alfred Conzeth apartenis al tiuj, kiuj kvankam ne vaste famaj, ĉar ili ĉiam ŝoviĝas en la duajn vicojn, laboris senĉese kaj sen-

profite, por ke aliaj povus agi kaj verki por la bono de Esperanto kaj realigo de ĝiaj homaranismaj idealoj.

Li naskiĝis 1913 08 12 en Brödeney (nun Essen), Germanio. Esperantistiĝis en 1928. Estis membro de GLEA kaj SAT, ankaŭ de UEA; ĝia delegito kaj fakdelegito pri presado. Ĉiam tre aktiva en sia Esperanto-medio; dum pluraj jaroj en Mettmann kaj Düsseldorf li estis bonega organizanto kaj eldonanto de diversaj Esperanto-presaĵoj.

Profesie li estis kompostisto, poste korektisto kaj lektoro. Por la profesio li lernis: Esperanton, la anglan, francan, hispanan kaj la rusan. Poste vojaĝante tra la mondo li lernis la italan, jugo-

slavan kaj hungaran. Krom tio, aŭto-didakte li studis la latinan kaj la grekan lingvojn.

Lingvoj estis lia granda pasio, sed ne malpli vojaĝoj. Jam en 1932 li komencis 18-monatan vojaĝon tra: Germanio, Aŭstrio, Italio, Jugoslavio kaj Hungario. Aparte li ekŝatis Jugoslavion. Tie, ĉefe post la 2a mondmilito, li estis 36 fojojn, sed ankaŭ plurfoje li vizitis Grekion kaj Hispanion. Pelis lin en la mondon granda interesiĝo kaj simpatio al diversaj popoloj. Memkompreneble, ke ĉie, kie li estis kaj nur eblis, li vizitis Esperanto-klubojn, aŭdiĝis prelegojn, amikiĝis.

Pri liaj aktivecoj, kiel bona spirito kaj animanto de Düsseldorfa Esperantomovado kaj pli vaste, pri lia redaktado, dum pluraj jaroj, de valora Esperantobulteno *La Radsaltanto*, eldoninto de diversaj literaturaĵoj, kaj aparte pri lia apogo al ĉiuj, kiuj ĝin bezonis, certe pli vaste skribos liaj, loke agantaj, amikoj.

Mi nur volas danke mencii, kiel bonŝancaj estis mi kaj Jerzy Fornal, renkontinte lin je nia Esperanto-vivovojo.

Tio okazis en 1989, dum la 62a SAT-Kongreso en Illertissen (Bavario). Mi tie prelegis kaj Jerzy prezentis du spektaklojn: la distran *La Granda Koncerto* kaj monodramon *Einstein – konfeso el Ŝeolo* de Gunnar Gällmo. Ĝi estis dediĉita al la 110a naskiĝ-datreveno de Albert Einstein, kaj prezentita premiere en Illertissen, urbeto proksime de Ulm, kie la granda sciencisto kaj pacifisto naskiĝis.

Evidente, A. Conzeth eksentis bezonon apogi nian laboron, ĉar post la s.m. spektaklo li venis kun gratuloj al Jerzy kaj proponis, ke li volonte eldonus la tekston de tiu teatraĵo. Lia propono estis tiel amika kaj spontaneca, ke ni tuj kaptis kun li spiritan kontakton, kaj el ĝi sekvis 10-jara tre fruktodona kunlaboro.

Entute li eldonis 7 programojn, ĉiam pli bonaspektajn, de Esperanto-teatro *Espero*, sed ne limiĝis al tio.

Okaze de la Centjariĝo de Esperanto-Teatro mi prilaboris ĝian historion. Li eksciante pri tio decidis la teatro-kajerojn eldoni. Rezulte de nia amika kunlaboro aperis 3 ĝiaj eldonoj: en 1990, 1993, 1996. Valoras mencii, ke ĉiu sekva eldono estis reviziita, pliampleksigita kaj ĝisdatigita. Ĝenerale dirite, estis granda kaj plena de bonvole lia laboro, per kiu li plendediĉe kontribuis al la Jubileo de la Esperanto-Teatro.

Tamen, ne malpli grava ol la laboro mem estis lia stimula kaj amika rilato al ni. Li faris ĉion eblan, por ke ni sentu nin bezonaj. El tio rezultis i.a., de li iniciatite, nia turneo tra Germanio, zorge kaj amike de li kaj Wolfgang Loose preparita. Dum ĝi ni estis plej elkore gastigitaj en la hejmo de Helga kaj Alfred Conzeth.

Neimageble, sed li, ja jam sufiĉe aĝa venadis al diversaj lokoj – okazis, ke eĉ al Belgio, kie mi kaj Jerzy kontribuis al iu Esperanto-aranĝo, por kun ni resti dum almenaŭ kelkaj horoj, alporti kelkajn librojn, kiujn ni eble bezonus...

La lasta nia, kiel ĉiam amika renkontiĝo, okazis la 2an de januaro ĉi-jare en Trier (Germanio), dum la 14a Internacia Festivalo. Plaĉis tie al li, kaj ni interkonsentiĝis kune partopreni ĉi aranĝon, en Saarbrücken fine de la kuranta jaro.

Tio jam ne okazos... Sed restos dankamemoro pri li kaj nia fruktodona amikeco.

Oni neniam devas forgesi, ke malantaŭ la spektaklaj eventoj, okazintaj fojfoje en la Esperanto-movado, staras tiaj nobluloj kiel karmemora Alfred Conzeth, 70-jarojn laboranta por Esperanto.

Sen ilia dediĉo kaj persista laboro la Movado ne povus daŭri kaj evolui.

Li restu en nia dankamemoro kaj koro.

Zofia Banet-Fornalowa
Raszyn, la 22an de majo 1998

novaĵoj

Kunveno kun maldekstraj grupoj okaze de la berlina UK

La berlina Maldekstra Forumo ĉi-monate invitis multe da maldekstraj organizaĵoj kaj gazetredakcioj partopreni informan kunvenon pri la «maldekstro en Germanio» okaze de la venontjara Universala Kongreso en Berlino. Ĝi okazos – ne kadre de, sed paralele kun la UK – en salono disponigota de la redakcio de *Neues Deutschland*. Membroj de la Maldekstra Forumo faros sinsekvajn interpretadon. Oni petas la invititajn grupojn nomumi reprezentanton por tiu kunveno kaj jam baldaŭ liveri kurtan sinprezantan tekston, kiun la Maldekstra Forumo esperantigos. (GM)

La homo, kiu eldefiis Babelon

Esperanta traduko de *L'homme qui a défié Babel*, franclingva biografio de Zamenhof aŭtorita de René Centassi kaj Henri Masson, jam delonge ekzistas, sed ĝia aperigo estas ankoraŭ necerta. (SAT-Amikaro, 1998 06)

Kep Enderby pri politikeco de Esperanto

Kep Enderby, longjara SAT-aktivulo kaj ĵus elektita prezidanto de UEA, konstatis en intervjuo aperinta en *Revuo Esperanto*, ke «...Esperanto estas per si mem politika afero! Lingvo ne povas ne roli politike. Labori por Esperanto signifas labori por lingvaj rajtoj – kiuj apartenas al la fundamento de la homaj rajtoj –, kaj batali por homaj rajtoj estas politika ago.» Pri la strategia perspektivo de Esperanto li opinias, ke «la 'fina venko' ne okazos morgaŭ: nek de Esperanto nek de la angla. Dume, ni multigu la praktikajn okazojn utiligi Esperanton kaj vaste informu pri niaj agadoj.» (RE 1998 09)

Opinienketo pri S.A.T.

Dum la 71-a SAT-kongreso en Odeso estis decidite fari tiun ĉi enketon. Bonvolu respondi al la subaj demandoj kiel eble plej precize kaj detale kaj sendi la respondojn al la SAT-sidejo. Ankaŭ vi povas doni la demandojn al viaj esperantistaj gemikoj, nemembroj de SAT, kiuj ankaŭ povas doni siajn opiniojn. Oni ne forgesu, ke SAT estas tutmonda neneŭtrala Esperanto-asocio, kun siaj specifaj celoj, kaj diferenca de neŭtrala UEA.

Jen la demandoj:

1. Kion vi scias pri SAT?

2. Ĉu SAT estas ankoraŭ necesa? (Ĉiam pensu ke la mondo ne estas nur Eŭropo kaj Okcidento!).

3. Kio interesas vin ĉe SAT kaj kial?

4. Kio ne plaĉas al vi ĉe SAT?


5. Ĉu, laŭ vi, la Statuto de SAT estas daŭre aktuala? Se ne, kio estus ŝanĝenda kaj kial?

6. Kion vi ŝatus ke SAT proponu al la esperantistaro kaj al progresemaj medioj.

7. Viaj proponoj.


8. Kiel varbi novajn membrojn kaj precipe la gejunulojn?

Tiu ĉi enketo estas nur informcela. Viaj respondoj helpos al ni por la estonta debato kaj por eventualaj konkretaj agoj favore al la pli brila estonteco de nia Asocio kaj la laborista Esperanto-movado ĝenerale. Do, ek al viaj plumoj!



lingva angulo

krucvortenigmo



Horizontale

- 1 periode ŝanĝi sian kliniĝon dum la rotacio (5)
 5 certagrade (3)
 8 senvesta (4)
 9 ovoforma figuro (5)
 11 persono, homo (3)
 13 sunsekigita briko (5)
 15 modifi (6)
 17 pisi [radiko] (4)
 20 persona pronomo (2)
 21 sendistinge kun pliaj aĵoj (7)
 22 pasea finaĵo (2)
 23 preĝeja tribunon por prediki (6)
 25 krude kaj per dentŝirado manĝi (4)

Vertikale

- 1 ordinara aŭ triviala esprimo (10)
 2 lirika poemo (3)
 3 interjekcio esprimanta malsatan senzorgecon (2)
 4 nedifinita afero (2)

Antaŭ monatoj ĉi tiu letero atingis la redakcion. Kiu deziras letere kontakti la skribinton?

Ntoto Zola
 B. P. 86 Mbanza-Ngungu
 Bas-Congo
 Kongo (Congo-Kinshasa)

2a de februaro 1998

Al kamarado Stephan A.

Vi eble kun surprizo ricevos mian leteron! Mi komencas, sendante al vi varmajn salutojn el Mbanza-Ngungu, kie mi loĝas, studas kaj kulturadas teron por povi pagi studkostojn ĉe la Universitato.

Skribante al vi, mi deziras ricevi de vi ian helpon. Tio estas: rilate al la terkulturado. Mi dezirus ricevi de vi semojn por mia ĝardeno: semojn de karotoj, de tomatoj, cepoj, ktp. Tion farinte, vi tre helpos min.

Esperante de vi komprenemon, mi plej samideane vin salutas.

Ntoto Zola

- 5 iuspeca (2)
 6 konjunkcio kunliganta samnaturajn komparitaĵojn (2)
 7 devizo (4)
 8 interjekcio atentovoka (2)
 10 okule percepti (4)
 12 metala peco por kunteni paperfoliojn (6)
 13 listo de farotaĵoj (6)
 14 internacia prefikso kun la signifo «du» (2)
 16 maskla, triapersona pronomo (2)
 17 koncerna politikan ŝtatunuiĝon (4)
 18 dependaĵo, akcesoraĵo (5)
 19 sekiĝi ekŝrumpante (5)
 24 negacia partikulo (2)

Informo el la ĉiutaga gazeto *Neues Deutschland*, eksa centra organo de SED de GDR

Savu la kapon de Karl Marx

En la urbo Wernigerode ekzistas la plej frua monumento honore al Karl Marx en Germanio. Estas busto, starigita en la jaro 1953 kaj forigita en oktobro 1989. La monumento estis restarigita kontraŭ la protesto de la loka kristandemokrata partio post la elektoj al la landa parlamento en aprilo. Post ĉi tiuj elektoj en la federacia lando Sachsen-Anhalt la socialdemokrata partio ne havis la majoritaton. Por eviti koalicion kun la kristandemokrata partio, PDS pretis akcepti socialdemokratian registaron kiel dum la antaŭaj kvar jaroj. Ĉi tiu modelo estas ĝis nun unika en Germanio, sed estas sola ebleco eviti pli dektran politikon.

Sed dum iu somera nokto la monumento de la granda filozofo iĝis objekto de privata alproprigo. Oni retrovis ĝin en laĝeto kaj decidis pli boni fiksi ĝin sur la soklo. Sed la timo restas. Tial alvokis la urba organizo de PDS (Partio de la Demokrata Socialismo) kaj ĝia frakcio en la urba parlamento kolekti donacojn por fari kopion de la historia monumento. La kopio el bronzo, kiel la originalo, kostos proksimume 9000 germanajn markojn. Kelkaj miloj jam alvenis el tuta Germanio.

La konto por sendi donacojn estas: PDS-KV-Wernigerode, Kontonumero 300 66 444 ĉe Kreissparkasse Wernigerode (BLZ 300 66 44)

La PDS en Wernigerode prezentas sin en interreto sub la adreso:
<http://home.t-online.de/home/pdshbs/buerowr.htm>

kaj eblas sendi mesaĝojn fakse al la numero +49 / 39 43 / 63 21 30)

Verkis: Roland Schnell

Enhavo:

	<i>paĝo</i>
neŭtraleco partieca (Sebastian Hartwig)	1
Mezismo ne estas neŭtraleco (Gary Mickle)	2
Kie ni staras? Statpriskribo de LEA/G (Sebastian Hartwig)	3
Kelkaj alineoj de ankoraŭ verkota Manifesto de hobiuloj (Gary Mickle)	5
Nova registaro (GM)	6
Tiuj, kiuj damaĝas la respublikon (<i>eltiraĵoj</i>) (Christian Jelen)	7
11a Konferenco de IKEK en Durban-Corbières (Francio) (Vincent Charlot k.a.)	8
Kio estas la celo de SAT? INFORMILA SEKCIO: <i>Letzte Nachrichten</i> (SAT-Amikaro)	11
Aldone al la estetika debato (I. F. Bociort)	15
Interparolo en la frukt- ĝardeno la 5-an de aŭgusto (<i>Newerly</i>): recenzo de H. Rodewig	16
Agado ĉe eŭroparlament- anoj – laŭspertaj kon- siloj (Germain Pirlot)	17
Alfred Conzeth (1913-1998) ne plu vivas (Zofia Banet-Fornalowa)	19
Opinienketo pri S.A.T.	21
NOVAĴOJ	21
LINGVA ANGULO	23
Letero de afrikano	23
Savu la kapon de Karl Marx (Roland Schnell)	24